

BRAZILA ESPERANTISTO

64-a Jaro

MARTO-APRILLO 1970

N.º 672-673

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, Societo de publika utileco (dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921). Jarabono eksterlande: 15 respondkuponoj.

Sidejo: **Praça da República, 54, 2.º** — Telefono: 242-4357 — RIO DE JANEIRO — BRAZILLO
Respondeca redaktoro (redaktor principal): **D-ro Carlos Domingues**



Antonio Caetano de Azeredo Coutinho

Pioniro el la pasinta jarcento - Direktoro de B.Ė.

★ 19-10-1879 - † 15-2-1970

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Balancete referente a 1969

Receita

	CR\$
Saldo de 1968	80,95
Assinaturas	1.217,72
Comissões	631,64
Contribuições	10.046,60
Cursos	2.400,00
Despesa de sede (B.K.E.)	300,00
Diversas receitas	1.967,50
Donativos	20,00
Revista (B.K.E.)	100,00
Serviço de Livros	4.564,07
	21.328,48

Despesa

Assinaturas	457,06
Biblioteca	315,00
Comissões	433,50
Cursos	63,00
Despesas de sede	3.216,18
Diversas despesas	1.098,46
Franquia	318,90
Informação	403,50
Material de Expediente	340,66
Quotas U.E.A.	6.410,69
Revista	2.937,00
Serviço de Livros	2.777,87
Serviços de secretaria	2.545,00
Saldo para 1970	11,66
	21.328,48

Rio de Janeiro, 2 de janeiro de 1970

Irani Baggi de Araujo
Tesoureira

STELO-MONEROJ

Donaco de S-ro Silveira al B.E.L.

Kiel memorajo pri sia vizito al la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, Nederlando, okaze de sia vojaĝo al Helsinki, S-ro Denizard Silveira donacis al Brazilia Esperanto-Ligo plenan kolekton de stelo-moneroj.

B.E.L. konservos la belajn monerojn en sia Esperanto-muzeo.

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazilia Esperantisto"	12,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	35,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	50,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	75,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota deste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota deste.	

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º

Rio de Janeiro, GB

PARA APERFEIÇOAMENTO

William Auld

PAŜOJ AL PLENA POSEDO

Progresiga legolibro de Esperanto kun ligvaj ekzercoj Cr\$ 16,00

A. Mazzolini

EKZERCILO-HELPILO

Por Supera Praktika Kurso de Esperanto - 2 vol. Cr\$ 9,00

LIBRO "ESPERANTO EN KOMERCO"

Raportoj de 100 firmoj kaj organizacioj el 40 landoj pri spertoj kun Esperanto. Ĉiu raporto en lingvoj Esperanto, angla, franca, germana, hispana, 100 paĝoj. Bonega varbilo. Esperanto-Rondo-Crailsheim-Germanujo. Prezo ĉe B.E.L.: CR\$ 4,00.

Antonio Caetano de Azeredo Coutinho

Nia tre kara veterano Antonio Caetano de Azeredo Coutinho forpasis en Rio de Janeiro la 15-an de Februaro 1970 pli ol 90-jaraĝa. Li estis sincere amata de ĉiuj siaj samideanoj, kaj tial lia morto estas profunde bedaŭrata. Li lasas en niaj vicoj grandan neplenigeblan malplenon. El multaj vidpunktoj li estis modelo, pri boneco, afableco, kompetenteco, sindonemo, sed precipe lin distingis perfekta konstanteco, kiun li ankaŭ montris dum pli ol 70 jaroj de esperantista vivo. Multaj venas al Esperanto kondukitaĵ de tiu aŭ alia motivo; pri Caetano Coutinho oni povas certe diri, ke li estis esperantisto simple kaj tute pro Esperanto mem.

Caetano Coutinho naskiĝis en Santana de Pirapetinga (hodiaŭ Pirapetinga), en Minas Gerais la 19-an de Oktobro 1879; en 1898 li fariĝis esperantisto, kaj jam en tiu jaro la fama poeto kaj kronikisto Olavo Bilac citis lin en kroniko, kiu estis transskribita en la libro *Critica e Fantasia* (Kritiko kaj Fantazio) eldonita en Lisbono en 1904. Coutinho ekkonis Esperanton per artikolo — *Pa-lestra* (Babilado) — de la konata jurnalistoj kaj teatroverkisto Artur Azevedo, en la gazeto *O Paiz* de la 12-a de Aprilo 1898. Ĉar en la artikolo estis citita la supera juĝisto D-ro Jacome Martins Baggi de Araujo (la 1-a brazila esperantisto, tiam loĝanta en Petrópolis), Coutinho kontaktiĝis kun li; ĉi tiu krom informoj, sendis al Coutinho la brouŝron n-ro 96.

En la 7-a de Junio de la sama jaro Caetano Coutinho skribis sian unan leteron en Esperanto, kiu estis adresita al D-ro L. L. Zamenhof en Varsovio.

Membro de la *Société pour la propagation de l'Esperanto* de Parizo, li ricevis de tiu asocio la diplomon de Profesoro — Atesto pri Kapableco — la 27-an de Julio 1903. Li estis la unua esperantisto en la Stato Minas Gerais kaj unu el la plej malnovaj en Brazilo. Li kunlaboris en pluraj gazetoj pri Esperanto kaj korespondis kun multaj samideanoj en la tuta mondo.

Zamenhof mem en la 1-a Universala Kongreso de Esperanto (Boulogne-sur-Mer, 1905) lin indikis por membro de la Lingva Komitato, sed li ne akceptis la grandan honoron.

Invitita de la aŭtoro, li tradukis portugalen la grandvaloran verkon *Premières leçons d'Esperanto* de Prof. Théophile Cart, per kiu granda nombro da portugallingvanoj lernis Esperanton, kaj kiu dum jaroj servis kiel lernolibro en Brazilo.

Li partoprenis en la 4-a Brazila Kongreso de Esperanto en Juiz de Fora, kiu malfermiĝis la 21-an de Aprilo 1911. Tiam li reprezentis la grupon *Suda Stelaro* de Campinas, en kies nomo li paroladis, kaj tie li konatiĝis kun Backheuser, Couto Fernandes kaj Melo e Sousa.

La 5-a Brazila Kongreso de Esperanto (Rio de Janeiro, 1912) donis al li la Diplomon de Profesoro.

En la *Adresaro* n-ro 19 li estis enskribita sub la numero 4.576. Sub la numero 4.580 aperas la nomo de D-ro João Avellar, unu el la adeptoj, kiun li varbis en Sete Lagoas. La interesa libro *Esperantaj Prozaĵoj*, kompilita de Beaufront en 1902, enhavas du brazilajn rakontojn: *La Miozoto* de Rosalia Sandoval, tradukita de Coutinho, kaj *La Tri Gutoj de Coelho Neto*, tradukita de Avellar. Antaŭe, en 1899 tiuj rakontoj aperis en la revuoj *L'Espérantiste* kaj *Lingvo Internacia*.

Estas interese rimarkigi, ke skribante por multaj gazetoj Caetano Coutinho uzis kuriozajn plumnomojn "Cotopaxi" (*Passa-Tempo* de *O Paiz*), "C. C." (*Revista Philatélica do Brasil* kaj *Brazila Esperantisto*), "Tatão" (*Almanaque de Lembranças Luso-Brasileiras*), "Esperantista Mineiro" (*Correio de Minas* de Juiz de Fora kaj *O Paiz*), "Nitetin" (*Lingvo Internacia*, *L'Espérantiste* kaj *O Paiz*), "Nitan Zelin" (*Almanaque de Lembranças, Almanaque das Senhoras* kaj *Almanaque Popular Brasileiro*), "Kotinju" (Brazila Esperantisto).

Ni akcentu, ke per sia pionira laboro — leteroj kaj artikoloj — Coutinho sin turnis al neesperantistoj, al nevarbitoj, kiujn li penis konduki al Esperanto. Lia eksterordinara merito estas, ke li plugis en ne plugitaj kampoj.

En la grava *Enciklopedio de Esperanto*, eldonita en 1933 de Literatura Mondo, Budapeŝto, Coutinho estas citita kiel unu el la plej eminentaj brazilaj

esperantistoj. La *Jarlibro* de U.E.A. prezentas ĉiujare liston de vivantaj pioniroj el la pasinta jarcento kaj Caetano Coutinho estas menciita inter ili. En 1937 li ricevis la Oran Jubilean Stelon de Esperanto.

La 35-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Parizo, 1950, laŭ propono de la Komitato de U.E.A. decidis akcepti kiel konoran membron nian veteranon Caetano Coutinho.

De 1941 ĝis 1952 Caetano Coutinho estis prezidanto de Brazila Klubo Esperanto, Rio de Janeiro, la plej malnova Esperanto-societo en Brazilo. Dum multaj jaroj li gvidis la Superan Kurson per Korespondado, kaj en tiu sindona laboro li konkeris la sinceran estimon de ĉiuj siaj grandnombraj lernantoj. Li plenumis la oficon de Delegito de U.E.A. pri la fako Farmacio.

Ekde 1947 li estis direktoro de *Brazila Esperantisto*. En tiu ofico li ne nur direktis nian oficialan organon en kunlaboro kun la respondeca redaktoro, D-ro Carlos Domingues, sed verkis multnombrajn artikolojn speciale tradukon de la romano *La Blua Banto* de Julia Lopes de Almeida, de rakontoj, maksimumoj, pensoj, anekdotoj, kronikoj ktp. Omaĝe al nia direktoro ni transskribas en ĉi tiu numero la belan historian kronikon *Flava Kastelo* kaj parton de gramatika studaĵo pri la portugala vorto *que*, en kiu li esploras 23 okazojn.

Grandvalora verkaĵo de Coutinho estas la autaŭparolo al la libro *Esperanto-Modelo*, kompilita de Ismael Gomes Braga kaj eldonita de Federação E. Brasileira en 1939. Tiu antaŭparolo estas mirinda sintezo de la unuaj jaroj de Esperanto en nia lando.

En la komenco de sia vivo Caetano Coutinho laboris en preĝejo en Pirapetinga. En Sabará li diplomigis en la Normala Lernejo en 1897. Li estis instruisto en la Farmbieno Pedras (Sete Lagoas) kaj poste en farmbieno de Piripiri, kie li ankaŭ oficis kiel sekretario kaj kontregistristo. En 1904 li transloĝigis al Ouro Preto, kie li studis en la fama Farmacia Lernejo kaj diplomigis en 1905. Li estis apotekisto en Pirapetinga kaj poste en Araxá. En ĉi tiu lasta urbo li estis urbkonsilanto dum du periodoj.

Veninte al Rio de Janeiro, li decidis sin submeti al konkurso por ofico en Nacia Departemento de Publika Sano. Aprobata, li estis nomita kaj plenumis

AL NIA AMIKO CAETANO COUTINHO OKAZE DE LIA EMERITIGO

Grava notico ĵus venas
Pri malnova samideano:
Jen el ofico eksigis
Nia kara Caetano!

La burokrataj laboroj
Ne plu okupigos lin!
De protokolaj tedaĵoj
Jen estas, fine, la fin'!

Nun, Caetan' apartenas
Al la rondo familia;
Kaj plenkore li revenas
Ankoraŭ pli nia, nia!

Al vi, do, ni ĉiuj diras
Kaj vin ĉirkaŭprenas frate:
Gratulojn! Vi nun ripozas
En "*otium cum dignitate*..."

Vi plenumis vian devon
Kun sindonemo konstanta!
Nun, al via idealo,
Al verda Stel' Esperanta!

J. B. Melo e Sousa

(El *Brazila Esperantisto* n-ro 436-437
Jul.-Aŭg 1950)

la oficon ĝis sia emeritiĝo kiel inspektoro en 1950. Adiaŭante lin, liaj kolegoj kaj amikoj faris brilan feston. Dum bankedo nia karmemora poeto J. B. Melo e Sousa deklamis la versojn publikigitajn en alia parto de ĉi tiu numero.

Li estis membro de Brazila Gazetara Asocio, honora membro de Brazila Asocio de Farmacistoj kaj fondinta membro de Nacia Akademio de Farmacio.

Ĉe la enterigo en Tombejo São Francisco Xavier, Brazila Esperanto-Ligo kaj Brazila Klubo Esperanto estis reprezentitaj de Prof. D-ro Carlos Domingues kaj komisiono de membroj. Ili ankaŭ ceestis la funebran meson.

Brazila Esperantisto denove kondolencas la familion, speciale la vidvinon, S-inon Laura de Abreu Coutinho, kaj la gefilojn, nian samideanon D-ron Lauro de Abreu Coutinho kaj S-inon Vera Coutinho de Carvalho.

FLAVA KASTELO

Antaŭ kelka tempo amiko kaj kolego donacis al mi tre interesan version de la brazila verkisto Gastão Penalva — “O aleijadinho de Vila-Rica”. (I)

Legante ĝin, mi trovis en la komenco de la ĉapitro “Ouro Preto dos estudantes” (O. P. de la studentoj) la jenon: “La *repúblicas* (2) okupas vastajn domojn, kaj havas strangajn nomojn, kiuj signas plaĉajn kontrastojn de grandeco kaj mizero. Oni vidas ofte okulfrapantajn ŝildojn: *Flavo Castelo*, kie oni nur parolis Esperanton; *Humaitá*, 15 de Novembro, *Ilha dos Rijos* (insulo de la Fortuloj), *Solar dos Lindos* (Nobeloĝejo de la Beluloj), *Castelo dos Nobres* (Kastelo de la Nobeloj), *Mansão dos Prontos* (Palaco de la Senmonuloj), *Tonel de Diógenes* (Barelo de Diogeno), *Dez Preparados* (Dez Kleruloj), *Cinco Diabos* (Kvin Diaboloj), *Bastilha* (Bastilo), *Jardim da Infância* (Patrino Lernejo, kie loĝas la barbaĉuloj)”.

La deveno de la ŝildo *Flavo Castelo* estas la jena: En la komenco de la jaro 1904 mi transloĝiĝis el la urbo Alémparaíba, kie loĝis mia familio, al Ouro-Preto por studi en la tiea Farmacia Lernejo. Tie mi ricevis la unuan ekzempleron de la libreto “Primeiras lições de Esperanto”, mia traduko de “Premières leçons d’Espéranto”, de Prof. Theophile Cart.

La traduko estis farita laŭ peto de T. Cart, kiu skribis al mi: “La tuta profito de la vendado de la Unuaj Lecionoj estos por la propagando inter la blinduloj. Hachette do nenion donas al tradukanto, kiel aŭtoran kompensajn por lia laboro. Se vi volas havi la grandan komplezon fari la tradukon, mi estos tre feliĉa kaj al vi tre dankema”.

La 19-an de Marto 1904 Cart skribis:

“Mi sendas al vi la unuan ekzempleron de nia gramatiketo. Mi skribas samtempe al Hachette, por ke li sendu al vi 25 ekzemplerojn, donace. Nun mi esperas ke oni povas labori en Brazilo...”

Al brazilaj gazetoj mi sendis kelkajn ekzemplerojn, kaj la ceterajn mi dandonis al kolegoj, dezirantaj koni la novan lingvon. Ĉiuj estis lernantoj pri farmacio, el la ŝtato São-Paulo kaj Mi-

LIBRO EKSPOZICIO EN MOZAMBIKO

D-ro Joaquim de Montezuma de Carvalho, delegito en Mozambiko de la brazila Nacia Instituto de la Libro, organizas en Lourenço Marques grandan ekspozicion de la Brazila Libro, kiu celas montri la kulturon de Brazilo.

Li skribis al B.E.L. kun peto por sendo de ĝiaj eldonaĵoj kaj ni jam ekspedis ekzempleron de ĉiu Esperanta verko eldonita de B.E.L. aŭ kun ĝia kunlaboro.

nas Gerais. Sekve mi organizis malgrandan elementam kurson de Esperanto, kies unuan lecionon, la 21-an de Julio 1904, mi faris ce la *república Castelo Amarelo* (Flava Kastelo), situanta tuj post la fama *república da Bastilha*, en la strato Pilar.

Ĝi estis la unua Esperanto-kurso farita en Brazilo. La fasado de la duaĝa domo en kiu funkciis la *república* estis flave pentrita. Tial la studentoj tie loĝantaj, kiuj antaŭe estis metintaj sur la balkonon la ŝildon kun la portugalaĵaj vortoj — *Castelo Amarelo*, esperantigis la nomon, kaj eble la unuan fojon oni legis en Brazilo Esperantan titolon: Flava Kastelo. Tiel ĝi daŭris dum multaj jaroj. Hazarde mi vidis, ke la *Seleta* (Krestomatia) de Lucia Alvarenga, pecoj de brazilaj aŭtoroj, (4-a eldono, 1946) ankaŭ enhavas la pecon de la libro de Penalva pri la *república Flavo Castelo* kaj aliaj en Ouro-Preto. Ĉu la postaj generacioj de studentoj modifis la Esperantan ŝildon kaj ĝin denove portugalis? Bedaŭrinde...

A. Caetano Coutinho

(1) Pr. *ualejĝdinju di Vila-Rika* (la Kripuleto de Vila-Rica, Antônio Francisco Lisboa, fama brazila skulptisto). Vila-Rica estis la primitiva nomo de Ouro-Preto, la tradicia ekĉefurbo de la ŝtato Minas-Gerais.

(2) *Repúblicas*, privataj komunloĝejoj de studentoj, laŭ la studenta slango.

(El *Brazila Esperantisto* n-ro 516, Marto 1957)

A PALAVRA 'QUE' E SUA TRADUÇÃO EM ESPERANTO

Na língua portuguesa a palavra *que* pode exercer todas as funções lexicológicas, exceto a de verbo. Assim, pode ser substantivo, adjetivo, pronome, advérbio, preposição, conjunção e interjeição. Daí, logicamente dever ser traduzida em Esperanto das mais variadas maneiras, de que damos a seguir alguns exemplos:

OL

Mais vale pouco que nada — *Pli bona io ol nenio*. Mais vale inspirar inveja que compaixão — *Pli bone estas enviigi ol kompatigi* (Z.) Mais vale um amigo íntimo do que um parente afastado — *Pli bona amiko intima, ol parenco malproksima* (Z.)

ĈAR

Entre, que está chovendo. — *Eniru, ĉar pluvas*. Façam silêncio, que estou escrevendo — *Silentu, ĉar mi nun skribas*.

ĈU

Que ele queira ou não queira. — *Ĉu li volas, ĉu ne volas*.

KAJ

Faça a João, que não a mim — *Faru al Johano, kaj ne al mi*. Pergunte-me, que responderei — *Demandu al mi, kaj mi respondos*. Cala-te, que eu me calarei — *Silentu, kaj mi silentos*. Corre que corre — *Kuras kaj kuras; kuradas*.

SED

Outro que não é — *Alia, sed ne li*. Maravilha feita de Deus, que não de humano braço (Camões) — *Mirindaĵo farita de Dio, sed ne de homa brako*.

SE

É melhor que ele parta — *Estas preferinde se li foriras*. Mesmo que eu

quisesse parar, não poderia. — *Eĉ se mi volus halti, mi ne povus* (Z.)

KVANKAM

Grande que seja a recompensa futura, não compensa o sacrifício presente — *Kvankam estu granda la estonta rekompenco, ĝi ne kompensas la nunan oferon*.

POR

Tenho muito que fazer — *Mi havas multon por fari*. E já do estio há pouco que passar até o outono (Camões) — *Kaj jam de la somero estas malmulte por pasi ĝis la aŭtuno*.

Que expletivo

Há expressões em que não é necessário o QUE, entrando nelas apenas para completar ou embelezar a frase:

Talvez que chova — *Eble pluvas*. Quase que morri — *Mi preskaŭ mortis*. Creio que não — *Mi kredas ne*. Que alegria que eu não teria — *Kian ĝojon mi havus*. Que sejas feliz — *Estu feliĉa*. Nós é que não vimos nada — *Ni nenion vidis*. Que Deus o abençoe — *Dio benulin*.

Em certas frases o QUE não é expressão de realce, mas desaparece, pela maneira de traduzir em Esperanto:

Sem quê nem para quê — *Sen motivo*. Tenho que partir — *Mi devas (bezonas) foriri*. Ele não temia fôsse o que fôsse — *Li timis nenion*. Raposa que dorme não apanha galinha — *Vulpo dormanta ne kaptas kokinon*. Cale o que dá e fale o que recebe — *Silentu donante, parolu ricevante* (Z). Havia gente como quê — *Estis granda kvanto da personoj*. Eis que Ofélia perdeu a razão — *Jen Ofelio perdis la prudenton* (Z).

A. Caetano Coutinho.

(*El Brazila Esperantisto* n-ro 460-461, Jul.-Aŭg. 1952)

ELEMENTOJ LATINAJ EN ESPERANTO

Franjo Modrijan

Muitos exemplos comentados. CR\$ 3,00

Aperfeiçoar o seu Conhecimento

...“Comecei, então, a evitar traduções literais, pensando diretamente na língua neutra. Daí por diante, senti que, em minhas mãos, ela deixava de ser mera sombra, sem base, dêste ou daquele idioma, com que eu lidava no momento; agora possuía espírito próprio, vida própria, fisionomia bem definida e claramente expressa, livre de quaisquer influências”.

Zamenhof

Traduza o trecho abaixo e aguarde o próximo número da revista para confrontar seu trabalho com nossa tradução. Colha ensinamentos, estudando os pontos de divergência.

O CÃO VIAJANTE

Carlos Drummond de Andrade

...Expus o caso a um cachorro de minhas relações, chamado Puck, e êle manteve comigo, por meio dos olhos e da cauda saltitante, êste diálogo quase maiêutico, embora às avessas.

— As malas eram quatro, diz você?

— Realmente, meu caro Puck.

— Com certeza eram malinhas à-toa...

— Não consta da notícia, mas presumo que fôssem malas consideráveis.

— E você quer insinuar com isso que cachorro em viagem não tem direito a mala.

— Não é bem assim. Pareceu-me que havia bagagem em excesso para viajante tão sóbrio de natureza, como - não é por estar na sua presença - eu considero o cão.

— E quantas malas tinha o grã-fino? Quarenta?

— A revista não diz, mas é de supor que trouxesse muitas.

— Você acha direito que um homem viaje com quarenta malas (por hipótese) e seu cão não tenha pelo menos quatro?

— Mas veja bem, Puck, o homem é um animal complicado, que se afastou da natureza. Vai a festas noturnas, que exigem equipamento especial; tem reuniões de negócio, de esporte, de amor, de guerra. Compra livros e até os lê. Precisa de tapetes, automóveis, discos, esmalte de unhas e tudo aquilo que vo-

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

ITALIA — Desde Fevereiro dêste ano a missa dominical da Basilica de Santa Maria, em Roma, é celebrada em Esperanto pelo reverendo G. Jacobitti. Ainda em Roma, foi celebrada missa em Esperanto na Capela do Instituto Pio XI, pelo reverendo Urbajtis, com acompanhamento de côro composto de jovens estudantes. Após o ofício religioso, o sacerdote fez breve palestra sobre os objetivos da língua internacional.

IUGOSLÁVIA — Teve lugar em Pula o Festival Internacional do Teatro Profissional, organizado pelo Clube Estudantil de Esperanto, de Zagreb. Foram apresentadas em Esperanto as peças “Manon Lescaut”, de Abbé Prévost, com adaptação de Vitezslav Nezval, e “Kataki ou o inimigo”, de autor americano em tradução de Jerzy Uspiński.

JAPÃO — Macuko Suzuki, uma jovem estudante de Humanismo na Universidade Municipal de Tóquio, obteve o diploma de doutorado em sua especialidade dissertando sobre “A História do Movimento Esperantista no Japão”.

PORTUGAL — A Sociedade de Língua Portuguesa criou em seu organismo um departamento de Esperanto. A Sociedade funciona na Rua de São José, 41 2.º andar, Lisboa.

cês, mais felizes, não conhecem ainda, ou desprezam.

— Essas coisas são necessárias à vida?

...
— Pelo que vejo, você tomou partido francamente por sua espécie contra a minha, quando as duas se entendem há milênios.

— Engano, meu caro... Todo êsse cuidado com um cão, um simples cão (pois somos simples, e esta é nossa maior virtude), revela que o homem não está de todo perdido, e já começa a desconfiar da existência do próximo. Por enquanto tem os olhos baixos, e só repara em alguns de nós, de mais “pedigree”. Amanhã descobrirá as criancinhas, e dia virá em que...

Brazila Kroniko

BAHIA

Buerarema — En la 26-a de Oktobro D-ro Aderaldo Rocha malfermis E-kurson laŭ peto de la loka impostkolektisto, lernanto ĉe la kurso en Itabuna. Ĉeestis pli ol 20 lernantoj inter kiuj profesoroj kaj lernantoj de la Komunuma Kolegio.

Itabuna — D-ro Aderaldo Rocha, profesoro de latina lingvo ĉe la Fakultato de Filozofio kaj de franca lingvo ĉe la Ŝtata Kolegio organizis E-kurson ĉe la Fakultato de Filozofio. La kurso, kiu komenciĝis la 13-an de Septembro, funkcias ĉiusabate kaj havas pli ol 80 lernantojn de ĉiuj kulturniveletoj, de unuagrada ĝis profesora.

MINAS GERAIS

Belo Horizonte — Estas fondita Instituto Esperanto de Educação, kies direktoroj estas S-roj Virgílio Pedro de Almeida, Vicente de Paula Viotti kaj nia samideano Onésimo da Costa e Faria. Oni intencas instrui intense en la Instituto la Internacian Lingvon.

Além Paraíba — S-ro Antonio Lopes de Oliveira Filho informas pri la aktivecoj en sia regiono. En la najbara loko Porto Velho do Cunha, RJ funkcias sabate kaj dimanĉe kun 15 lernantoj, kurso gvidata de nia samideano F-ino Sulamita de Castro, kiu havas diplomon de B.E.L.. Alia kurso en Ilha dos Pombos, RJ estas organizata ankaŭ sub la gvido de la sama kursgvidantino kaj ĉe komenco jam havas 12 lernantojn. S-ro Oliveira Filho projektas okazigi ekzamenon por la lernantoj kaj ankaŭ organizi Superan Kurson.

GUANABARA

Rio de Janeiro — Laŭ plano de la profesorino de portugala lingvo, S-ino Lia Guimarães Motta, grupo da lernantoj de Ŝtata Gimnazio Prezidanto Getúlio Vargas, en Osvaldo Cruz, vizitis nian Ligon en la 1-a de Novembro por fari intervjuon pri Esperanto. La gejunuloj Lucia Helena Wehbeh Fontes, Nelson Antonio Herrera Raine, Deise Limeira kaj Marília dos Santos son-

bendis siajn diversajn demandojn kaj la respondojn donitajn de nia bibliotekisto Kolonelo Jorge Campos de Oliveira. Por la Biblioteko de la Gimnazio estis donacita informo materialo.

SÃO PAULO

São Paulo — En la 15-a de Dec. estis enoficigita la nova estraro de São Paulo Esperanto-Asocio, kiu konsistas el jenaj personoj: Prez. S-ro Nelson Silveira, Vicprez. S-ro Eurico A. Ribeiro, 1-a Sek. F-ino Tereza Alonço, 2-a Sek. S-ro Joaquim S. de Oliveira, 3-a Sek. S-ro Deodato F. Melo, 1-a Kas. S-ro Helio F. Salema, 2-a Kas. F-ino Elizabete Marcelo.

RIO GRANDE DO SUL

Porto Alegre — Esperantista Societo de Porto Alegre raportis pri siaj trafikaj informaj aktivecoj. En 1968 ĝi publikigis en la ĵurnalo "Correio do Povo" 54 novaĵojn pri la E-Movado kaj aperigis 5 artikolojn: 2 de S-ro E. Breitenbach, 1 de S-ro Wilson M. Cunha kaj 2 de D-ro M. Belmonte de Abreu. Ĉi tiu lasta samideano verkis ankaŭ artikolon por la revuo "Cultura Contemporânea" sub la titolo "Esperanto — Lingvo por la Popoloj", kiun B. E. aperigis kiel ĉefartikolon en la n-ro Jan. Ap. 69.

— Sukcesplene efektiviĝis en la Arternejo de la Universitato de Rio Grande do Sul la 1-a Internacia Ekspozicio de Infana Desegno (6/16 Oktobro) kun la ĉeesto de la esp-isto arkitekto D-ro Ivo Sanguinetti kaj de lia edzino, direktoroj de la Porinfana Arternejo kaj organizintoj de la ekspozicio; ĉeestis ankaŭ civilaj, konsulaj kaj edukaj aŭtoritatoj. La ceremonio estis inaŭgurita de S-ino Antonieta Barone, direktorino de Arta Edukado, kiu reprezentis la Ŝtatan Sekretarion de Edukado. En la nomo de E. Soc. de Porto Alegre parolis la supera juĝisto D-ro M. Belmonte de Abreu, kiu akcentis la rolon de Esperanto en la afero, ĉar la prezentita materialo estis havigita dank'al interŝanĝo de korespondado en la Internacia Lingvo, sekve de kio oni ricevis kunlaboron de 30 landoj. Vizitis la ekspozicion pli ol 2.000 personoj, krom lernantoj de elementaj kaj porinfanaj artaj lernejoj.